Esperanto por mi

16 geesperantistoj
portretitaj de HELGA PLÖTNER

12



HORIZONTO



1. Luiza CAROL (Rumanio / Israelo)

Mi naskiĝis en juda familio de Rumanio en 1947 kaj vivis en mia denaska urbo Bukareŝto ĝis 1980. Poste, mi elmigris en Israelon kun mia familio. Mi estis instruistino kaj verkistino.

Esperanton mi eklernis, kiam mi estis 58-jara, pere de la programo “lernu!” (en 2005-2006). Ekde tiam, dum ok jaroj mi partoprenis la ĉiumonatajn Esperantajn renkontiĝojn en Hajfo. Ĝia gastigantino estis Martha Otto, tiutempe laboranta en la Bahaa Centro de Hajfo. Martha estis inter alie gvidanto de pilgrimoj kaj turistoj el la tuta mondo, vizitantaj tiun Centron kaj ĝian splendan ĝardenon.

Inter la esperantistaj gastoj de Martha, troviĝis israelanoj apartenantaj al ĉiuj etnoj kaj religioj de tiu ĉi lando, samkiel eksterlandaj vizitantoj. En la hejmo de Martha, la etoso estis tia, ke oni povis senti la konkretiĝon de la vortoj de la Bahaa profeto: “La mondo estas nur unu lando, kaj la homaro, ĝiaj civitanoj.”

En la hejmo de Martha, mi sentis min kvazaŭ en utopia mondo sen landlimoj, mondo, kie jam “falis muroj de miljaroj”. Tie eblis mediti pri kiom bela estus nia mondo, se oni ĉesus batali por pecoj da tero kaj oni vivus en “ronda familio”.

Inter 2006-2007 mi partoprenis la korespondan perfektigan kurson de Boris Kolker laŭ lia libro “Vojaĝo en Esperanto-lando”. Mi estos ĉiam danka al Boris, ĉar li ĉiĉeronis min en la komenco de mia fascina vojaĝo tra Esperanta kulturo kaj tra la historio de la Movado. Boris kuraĝigis min verki en Esperanto kaj kontribui laŭ miaj ebloj al la Esperantista vivo. Nuntempe, tio multe riĉigas mian vivon.



La supra foto estas farita de Jehoŝua Tilleman en 2008, kiam Boris vizitis la Bahaan ĝardenon. Mi troviĝas inter Martha kaj Boris.



2. CHIMEDTSEREN Enkhee (Mongolio)

Mi naskiĝis en Ulanbatoro, la ĉefurbo de Mongolio, en 1968. Mi estas bakalaŭro pri mongolaj studoj kaj magistro pri edukado.

En la periodo de la 1990-aj ĝis la 2010-aj jaroj, mi instruis la malnovan mongolan skribon kaj gramatikon en universitatoj kaj kolegioj. Mi ankaŭ laboris kiel vicprofesoro pri tiuj fakoj. En la jaroj 2013 - 2016 mi laboris en la kampo de socia bonfarto kiel ŝtata oficisto.

En 1991 mi unuafoje renkontis esperantiston. Li estis profesoro pri filologio kaj eminenta esperantisto s-ro Tugchin Chimid Dogsuren. En 1993 li organizis Esperanto-kurson, al kiu mi aliĝis. De tiam mi aktive partoprenas en la Esperanto-movado: mi instruis Esperanton kaj volontule plenumis diversajn respondecojn en la landa movado, interalie kiel kasisto, sekretario

kaj prezidanto de la landa asocio. Poste mi fariĝis ankaŭ estrarano de Komisiono pri Azia-Oceania Movado kaj Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, en kiuj mi daŭre volontulas.

Mi ankaŭ provis kontribui al la Esperanto-literaturo kaj al la disvastigo de Esperanto en Mongolio per redaktado kaj tradukado. En 2002 mi redaktis la mongolan version de la unua volumo de "Esperanto en la 21-a jarcento" de LEE Chong-Yeong. En 2008 mi tradukis en la mongolan la libron "Esplorado en Japanio: Oomoto" de Umesao Tadao. En 2012 mi redaktis la verkon "Jen Oomoto" de A. Batbayar.

Per mia instruado kaj organiza laboro, mi penis kontribui al la evoluigo kaj disvastigo de Esperanto en Mongolio kaj al ĝiaj internaciaj rilatoj.



Patro: Baljinnyam Chimedtseren, Patrino: Tseren Tsedevdulam, la plej malpliaĝa filo: Enkhee Tuvshin kaj mi.



3. Edeltraut HENNING (Germanio)



Mi naskiĝis en novembro 1939 en la urbeto Gennin en la nuna Pollando. En 1944 mia patrino, kiu perdis sian edzon en la milito, fuĝis kun 4 infanoj. Ni migris tra la norda parto de Germanio. Finfine en 1947 ni ricevis loĝejon en la urbo Neustrelitz en eksa Germana Demokratia Respubliko (GDR).

Ekde 1949 mi frekventis la lernejon tie ĝis la abiturienta ekzameno. Poste mi studis en la Humboldt-Universitato geografion kaj la rusan lingvon kaj fariĝis instruistino. Ĝis mia 60-jariĝo mi laboris sen paŭzo en diversaj lernejoj kaj urboj.

Mi naskis 3 infanojn. Kiam mia filino konatiĝis kun du samklasaninoj, kiuj parolis Esperanton, ŝi eklernis ĝin. Ankaŭ al mi plaĉis tiu lingvo kaj mi eklernis. Kun aliaj esperantistoj mi fondis klubon. Baldaŭ ni kunlaboris kun esperantistoj en la polaj urboj Koŝalin kaj Szczecin.

Multajn jarojn mi partoprenis en multaj Esperanto-aranĝoj; en 15 Uk-oj, en germanaj kaj polaj konferencoj, en renkontoj en Prenzlau en Germanio, en feriado en Mielno en Pollando, en ARKONES (Artaj Konfrontoj en Esperanto) en Poznano, Pollando, en feriado en Wrocław en Pollando ktp.

Dum mia tuta Esperanto-vivo mi kompilis kaj faris kronikon. De tempo al tempo mi skribas artikolojn pri Esperanto por la loka gazeto. Ĉar mi ŝatas legi, mi estas membro de Esperanto-Sumoo.

Esperanto estas mia vivo. Danke al ĝi mi ekkonis multajn bonkorajn kaj helpemajn homojn, kiuj agadas por paco kaj interkompreniĝo inter la tuta homaro. Por ke Esperanto disvastiĝu pli, mi ĉiam varbas Esperanton kaj hisas Esperanto-standardon ĉe mia balkono.

Kun du polinoj, Wanda Kicman kaj Ania Laskowska, kaj du junuloj.



4. HONG Sungcho (Koreio)

Mi naskiĝis en kampara vilaĝo de la urbeto Imsil, Koreio, en 1957. Mi fariĝis esperantisto en 1978. Dum mi lernis Esperanton, profunde kortuŝis min la ideo de Homaranismo, kiu celas harmonion kaj egalecon de la tuta homaro trans lingvaj kaj kulturaj diferencoj. Pro tio mi ĉiam sentis, ke ankaŭ mi devas ion fari por kontribui al tiu idealo.

Aktive partoprenante en Esperanto-eventoj, mi konatiĝis kun multaj samideanoj. Mi gvidis multajn Esperanto-kursojn kaj, kune kun kursanoj, fondis grupojn por regule renkontiĝi, studi kaj agadi. Mi fondis Esperanto-rondojn en Ŭonbulismo (1980) kaj en du knabinaj gimnazioj (1982 kaj 2001). En 1983 mi estis membro de la prepara komitato por la fondo de la Incheon-filio de Korea Esperanto-Asocio (KEA).

Post universitata diplomiĝo mi fariĝis instruisto pri biologio (dum 40 jaroj). Danke al tio, mi povis prelegi dum la UK en 2017 pri Korea Edukado kaj Religio, kaj en aliaj renkontiĝoj pri interesaj rakontoj pri birdoj, plantoj, bestoj, floroj, insektoj ktp. Speciale, laŭ la rekomendo de eksa estrarano de UEA, s-ro Lee Jungkee, mi dufoje prelegis rete pri koreaj birdoj en Aŭstralio kaj Brazilo.

Mi kunaŭtoris du librojn “Papilia D-ro D. M. Seok” (2005) kaj “Historio por Malfermi Estontecon” (2007). Mi estis ĉefredaktoro de la oficiala organo de KEA (2007–2010), kaj ekde 2019 rolas kiel aŭspicia estrarano de KEA.

Esperanto estas mia eterna espero. Eĉ en malfacilaj momentoj, ĝi ĉiam donas al mi esperon, energion, viglecon kaj kuraĝon. Danke al ĝi, mi ankaŭ hodiaŭ feliĉe vivas en Esperantujo kun bonaj amikoj.



Malferma ceremonio de la 102-a UK en Seulo en 2017



5. Aleks KADAR (Francio)

Mi naskiĝis la 8-an de oktobro 1975, en Parizo, Francio. Esperanton mi malkovris fine de 1998 en Berlino, kiam mi studis tie.



Mi aktivas aŭ aktivis interalie en TEJO, en Espéranto-France, en Eŭropo Demokratio Esperanto, la loka asocio

Esperanto Parizo-Francilio kaj la Eŭropa Komisiono de UEA.

Kiel Ĝenerala Sekretario de UEA ekde februaro 2018, mi gvidas la laboron de la Estraro, organizas la estrarajn kunsidojn (ĉiun duan sabaton), la komitatajn kunsidojn, starigas la retajn voĉdonadojn, kunordigas la pretigon de la estraraj raportoj, strebas al ĉiama glata funkciado de la Asocio.

Ekde 2025 mi aldone oficas kiel estrarano pri Faka Agado kaj organizas la Fakan Forumon dum la UK kaj la Virtuala Kongreso (VK). Dum la UK mi respondecas pri organizado de la Kleriga Lundo (ekde 2023) kaj pri la UEA-programeroj.

Mi ĉiam restas je la dispono de la membroj kaj de ĉiuj esperantistoj dezirantaj aktivi por nia afero, por informi ilin kaj subteni iliajn ideojn aŭ projektojn.

En Esperantio mi prelegis pri kelkaj temoj: sigloj kaj akronimoj, *otaku*-oj, ido, ĉionismo, UEA, cifereca poluado ktp.

Krome mi havas plurajn ŝatokupojn, interalie kinarto. Mi provas ĉiuvespere spekti filmon kineje.

Por mi tre gravas Esperanto: dank' al ĝi mi vojaĝis al multaj lokoj kaj mi havas amikojn kaj kontaktojn en diversaj landoj. Dank' al Esperanto mi ĉiam estas okupata, ĉu por distriĝi, ĉu - pli ofte - por labori.

Post la Solena Inaŭguro de la UK 2026
en Graz kun la aliaj estraranoj de UEA



6. Zahra KARIMI (Irano)

Mi naskiĝis en 1956 en Teherano kaj laboras kiel universitata instruistino pri ekonomio en Babolsar ĉe la bordo de la Kaspia Maro. Mi eklernis Esperanton en 1987, dum la Irana-Iraka milito. Mia instruisto estis Reza Kheirkhah, kiu

ĉiusemajne venis al nia hejmo por instrui Esperanton al mi kaj mia edzo. Baldaŭ Esperanto fariĝis grava parto de mia vivo.

En 1990 mi tradukis el Esperanto en la persan la libron de Saionji Masayuki pri la kuracmetodo Yumeiho. Poste mia edzo, Gholamreza Azarhoushang, laboris en Japanio kun Saionji Masayuki kaj Reza Kheirkhah. Nun ni havas Yumeiho-klinikon en Babolsar. Tie troviĝas ankaŭ malgranda Esperanto-biblioteko, kaj ni regule organizas kursojn kaj kunvenojn.

En 1996 mi estis unu el la fondintoj de la Irana Esperanto-Asocio. Mi instruis Esperanton en Teherano kaj Babolsar, prelegis en multaj landoj pri la ekonomio kaj la Esperanto-movado en Irano, kaj verkis artikolojn por la revuoj “Irana Esperantisto” kaj “Monato”. Miaj lastaj du artikoloj aperis en Monato en januaro kaj oktobro 2025: *Kresko de perforto en Mez-Oriento montras malkapablon de internaciaj institucioj (*https://www.monato.be/publika/013798p.php) kaj *Lecionoj de la ekonomia miraklo de Ĉinio por evoluantaj landoj* (https://www.monato.be/publika/013816p.php).

Ni gastigis esperantistojn el Germanio, Pollando, Japanio, Finnlando ktp., montrante al ili vidindaĵojn de Teherano, Babolsar kaj aliaj regionoj. Dank' al Esperanto mi vizitis multajn landojn kaj pli profunde konatiĝis kun iliaj kulturoj kaj ekonomiaj situacioj.

Esperanto malfermis al mi la pordon al la mondo. Mi konatiĝis kun multaj karaj geamikoj. Dum preskaŭ kvar jardekoj Esperanto riĉigis mian vivon kaj fariĝis ĝia neapartigebla parto.



Hejme kun mia edzo en 2023



7. Carlos Alfonzo MIRANDA Bravo (Peruo)

Mi naskiĝis en februaro 1962 kaj loĝas en Lima, Peruo. Mi estas advokato kaj UEA-delegito de Peruo.

M eklernis Esperanton en 1987 per la libro “Sabe Ud. Esperanto”. Mi praktikis tiun belan lingvon koresponde kaj interrete kun eksterlandaj esperantistoj. Mi jam partoprenis en UK-oj okazintaj en Fortaleza, Brazilo, en 2002, en Bona Aero, Argentinio, en 2014 kaj en Lisbono, Portugalio, en 2018. Mi partorprenis ankaŭ en virtualaj UK-oj en 2023 kaj 2024.

Dum tiuj kongresoj mi konstatis, ke Esperanto vere funkcias kiel taŭga ilo por frata komunikado, malgraŭ ke sperantistoj havas malsamajn lingvojn kaj kulturojn.

Mi plu lernis Esperanton en meznivela kurso en oktobro kaj novembro 2025 organizita de UEA kaj Kolombia Esperanto Asocio. Mi partoprenis en la jubilea 100-a Sumoo en julio 2026.

Temas pri la perua Esperanto-movado, al Peruo Esperanto venis el Francujo en 1901. La unua pioniro de Esperanto estis d-ro Frederiko Villareal. Li estis amiko de Zamenhof kaj partoprenis en la unua UK en Boulogne-sur-Mer en 1905. Bedaŭrinde post lia morto la movado haltiĝis. Sed post la dua mondmilito la movado revivis.

Nun ni laboras por divastigi Esperanton ĉefe virtuale, kaj en junio 2026 ni organizis “Virtualan Amertkan Renkontiĝon inter Esperantistoj”.

Nuntempe troviĝas esperantistoj en urboj Cajamarca kaj Piura en la norda parto de Peruo, Lima, Callao kaj Huacho en la marborda centra parto, Arequipa, Puno, Tacna kaj Cusco en la suda parto.



Dum Esperanta Kunveno en decembro 2024

V IVU ESPERANTO!! VIVU FRATECO KAJ PACO!!



8. Cícero Carlos OLIVEIRA da SILVA (Brazilo)

Mi naskiĝis en Juazeiro do Norte, Cearao, Brazilo, en 1971. Mi estas brajla instruisto, diplomiĝinte pri franca literaturo kaj bibliotekscienco kaj specialiĝinte pri speciala edukado kaj instruado de la hispana lingvo. Mi instruas brajlon kaj origamion. Nuntempe mi laboras en la faka eduka servo.

En 2002 brazila amiko sendis al mi lernolibron de Esperanto. Tiutempe mi ne multe atentis kaj donacis la libron al iu uzanto de la biblioteko, kie mi laboris. Dek tri jarojn poste, mi malkovris, ke la

persono, al kiu mi donacis la libron, fariĝis flua parolanto de la lingvo. Invitite de la amiko de la lernejo, kie mi laboris, en 2015 mi decidis lerni Esperanton.

Ni rapide kreis klubon kaj trovis lokon por renkontiĝoj kaj poste bazaj lingvokursoj. Mi povas diri, ke Esperanto estas mia terapio; mi estas malsama homo kun pli malferma menso al lernado de aliaj lingvoj. Nuntempe mi partoprenas semajnajn renkontiĝojn, havas amikojn en diversaj landoj kaj partoprenas projektojn per Esperanto.

Mi estas kunfondinto de la Esperanto-Klubo Karirio kaj fondinto de Poliglota Klubo de Juazeiro do Norte en 2016. Mi estas kunlaboranto de la internacia projekto EsperORI (Projekto, kiu kunigas origamion kaj la internacian lingvon Esperanto). Kiam ajn mi afiŝas bildon de origamio en sociaj retoj, mi ĉiam skribas ion en Esperanto apud ĝi. Mi estas persono, kiu volas lerni ĉi tiun mirindan lingvon. Mi lernis pli aprezi amikecojn kaj lingvolernadon.



Foto prenita ĉe loka kunveno por antaŭenigi Esperanton en komunumo kaj festi Esperanton kiel la lingvon de amikeco.



9. Larysa OSADCHUK (Ukrainio)

Mi naskiĝis en 1958 en Kievo, Ukrainio, nun loĝas en Francio. Laŭ profesio mi estas biologo-genetikisto, pupteatra reĝisoro kaj origamiisto, esperantistiĝis en 2012.

La unuan fojon mi aŭdis pri Esperanto antaŭ tre multaj jaroj de mia amiko, Ahman Junusov, konata esperantisto el Dagestano, Rusio. Tiam, mi pensis: “Sed tio ja estas mortinta lingvo sen kulturo kaj popolo. Mi ne bezonas ĝin.”

Pasis dek jaroj. Mi denove renkontiĝis kun Ahman, kaj li denove parolis pri Esperanto. Sed ankaŭ tiam io malhelpis al mi aliĝi. Post kelkaj jaroj tute hazarde mi eksciis, ke Esperanto-klubo troviĝas sur mia strato en Kievo. Tiam mi komprenis, ke tio estas la sorto.



De 14 jaroj mi okupiĝis pri origamio kaj Esperanto, strebante popularigi ilin kaj helpi enkonduki ilin en lernejojn kaj universitatojn. Esperanto kaj origamio similas al konstruludilo, havante komunan esencon. Unu kreas pontojn per vortoj, la alia per papero. Ambaŭ alportas ĝojon, reciprokan komprenon kaj amikecon.

Mi kun Alain Delmotte, esperantisto el Belgio, de jaroj prelegas pri ili dum internaciaj renkontiĝoj de esperantistoj (en UK, IIK, ILEI ktp.) kaj aliflanke

strebas interesi la origamiistojn pri Esperanto.

Dum la UK en Lisbono en 2018 naskiĝis la internacia movado EsperOri. Jam de 7 jaroj ni preskaŭ ĉiun dimanĉon renkontiĝas rete por prelegi kaj diskuti interesajn temojn kaj origamumi en Esperanto (eventaservo.org).



Poste naskiĝis la ideo organizi la Unuan Kongreson EsperOri en oktobro 2026 en Montpeliero, Francio por kunigi Esperanton kaj origamion kaj prezenti la potencialon de ili al la publiko.

10. Anna kaj Mark PENTUS (Rusio)



Mi kaj mia edzo Mati esperantistiĝis en 1999. De tiam ni kune iras laŭ la Esperanta vojo. Ni havis tre bonajn instruistojn: Boris Kolker kaj rusaj fervoraj esperantistoj de la retpoŝta dissendolisto "esperanto-kurso". Fininte la studadon, ni mem iĝis instruistoj tie. Ni instruis Esperanton al nia filo Mark, kiu naskiĝis en 2012. Lia esperantista vojo komenciĝis en 2018. En 2019 ni

triope partoprenis en la UK en Lahti, Finnlando. Nun nia tuta familio partoprenas en Esperanto-Sumoo, belega projekto de Hori Jasuo!

En 2000 ni iĝis lingvaj reviziantoj por la revuo "Monato". Jam kelkajn jarojn mi
partoprenas ankaŭ en la kreado de aŭdversioj de la revuoj "Esperanto" kaj "Monato". Verkado kaj tradukado ĉiam estas parto de nia Esperanta vivo. En la 2000-aj jaroj ni kelkfoje venkis en la literatura tradukkonkurso "Liro".

Por mi Esperanto estas lingvo konektanta homojn, permesanta riĉigi mian propran kulturon kaj estimi fremdajn kulturojn. La interna ideo de Esperanto ĉiam vivas en mia animo. Mia agado estis ligita kun lernado, analizado, verkado kaj instruado de la lingvo. Mi faras tion kun kaj por aliaj homoj, por ke ni ĉiuj pli bone komprenu aliulojn kaj nin mem.



11. Werner PFENNIG (Germanio)

Mi naskiĝis la 30-an de aŭgusto en 1943 en limurbo Eydtkuhnen en Orienta Prusio. Mi loĝas en nordorienta Germanio.

Inter 1968 kaj 1973 mi studis fakon de inĝeniero pri maŝinkonstruo. Poste mi laboris pri nutraĵo-maŝinoj. Post la reĝimo-ŝanĝiĝo en 1989 en Germana Demokratia Respubliko (GDR) ĝis pensiuliĝo mi laboris en ŝtata asekuro.

En 1956 mi interesiĝis pri Esperanto. Tiu lingvo donis al mi tiom da ĝojo kaj plezuro, sed la vera praktika uzo de la lingvo okazis jarojn poste dum la kunveno en Hungario. Ĝis nun mi

aktivas jam 70 jarojn en la Esperanto-movado sen paŭzo.

Tiutempe en GDR oni ne permesis organizitan Esperanto-movadon. Ni ne havis rondojn, revuojn, kunvenojn ktp, tial ni uzis korespondadon, kaj ĉiuj leteroj el fora eksterlando donis al ni ĉiam grandan ĝojon. Finfine en 1965 nia registaro permesis al ni fondi Esperanto-rondojn en la Germana Kulturligo kaj ni povis aranĝi kursojn kaj aranĝojn.

Niaj infanoj Nils kaj Ulta naskiĝis respektive en 1980 kaj en 1981, al kiuj ni peris Esperanton kiel denaskan lingvon. Laŭ principo "unu persono, unu lingvo", kiu signifas, ke unu persono nur uzu unu lingvon. Interparolante kun la infanoj, mi kaj mia edzino tiel praktikis ekde la unua tago de ilia vivo. Mia edzino ĉiam uzis "sian panjo-lingvon" kaj mi ĉiam uzis “mian paĉjo-lingvon”.

La plej granda malhelpo estis miaj esperantaj geamikoj. Kvankam mi petegis ilin, ke ili parolu nur Esperanton, kelkaj ne obeis kaj montris sian scion de la germana lingvo. La infanoj do tuj ŝaltis al la germana. Per tia ago Esperanto-amikoj pruvis, ke ili estas la plej malbonaj varbiloj por nia lingvo. Nun Nils kaj Ulta uzas Esperanton laŭ okazoj kaj ni scias, ke ili atentas Esperanto-aferojn, sed ili ne aktivas.

Mi nun estas maljuna, sed mi regule partoprenas en aranĝoj en nia loka rondo kaj en la urbo. Ni uzu nian lingvon ĉiam, kiam eblas. Tiu simpla afero estas pli grava ol teda varbado.



12. SAIKI Akira (Japanio)

Mi naskiĝis en 1943 en la gubernio Gihu en la meza parto de Japanio. Mi estis instruisto pri arkitekturo. Mi eklernis Esperanton en 1997, kiam mi estis 53-jara.

Utiligante Esperanton mi sola vojaĝis en Vjetnamio en 2001. La vjetnamaj popolanoj travivis la militojn kontraŭ Japanio, Francio kaj Usono. Mi interesiĝis pri la vivo de la vjetnamoj dum la epoko de la militoj, kaj en mi ekflamis la ideo eldoni esearon pri Vjetnamio. Kun helpo de vjetnamaj esperantistoj mi kolektis rilatajn verkojn en Esperanto, ilin tajpis, presis kaj bindis. Tiel mi eldonis la libron “Raportoj el Vjetnamio” en 2001.

Legante la libron, oni komprenos, ke ordinaraj vivoj de ordinaraj homoj en neordinara tempo estas neordinaraj, kaj ke en tia tempo ordinaraj homoj mem iufoje fariĝas neordinaraj homoj, eĉ herooj!

Mi estas origami-amanto, sed mi estas ne kreema, do preskaŭ ne havas mian proprajn origamiajn verkojn. Mi ĉefe studis japanan papergruon (*orizuru*) kaj ĝiajn variaĵojn. Mi prelegis pri origamio en Aziaj Esperanto-Kongresoj kaj en la UK en Kubo en 2010.

Mi estas ankaŭ kantoamanto. Mi eklernis klasikan kantadon, kiam mi estis 70-jara. Kvankam mi estis jam ne juna, oni laŭdis mian voĉon, kaj mi kantis en kelkaj koncertoj. En 2024 mi okazigis mian propran recitalon sub la titolo “La recitalo de 80-jara tenoro”. Mi kantis en la itala, japana kaj ankaŭ en Esperanto. La recitalo, kiun ĉeestis pli ol 200 spektantoj, estis tre sukcesa kaj kortuŝa. Lastatempe mi partoprenis en kelkaj kantokonkursoj, en kiuj mi gajnis premiojn.

Esperanto ja estas mia kara hobio. Mi multe plezuris per ĝi.



En Esperanto-Domo de Jacugatake en junio 2026. Plej dekstre mia edzino Masajo.



13. Astrid Caroline SASTOQUE COPONADO (Kolombio)

Mi naskiĝis a 23-an de februaro 1982. Mi loĝas en Bogoto, la ĉefurbo de Kolombio, kaj laboras kiel rajtigita lingvoinstruisto.

Mi parolas la francan kaj la anglan krom la hispana, kaj komprenas la portugalan kaj la italan. En la universitato mi vidis publikaĵojn pri Esperanto. Sed laboro kaj akademia vivo ne permesis min proksimiĝi al Esperanto.



Feliĉe post pandemia periodo en 2023 mi povis aliĝi al la virtuala lingvoklubo de la Biblioteko Luis Angel Arango en mia urbo. Mi eklernis Esperanton rete kun Esperantaj geamikoj el Brazilo, Hungario, Hispanio, Ukranio kaj Italio, kaj tie mi renkontis nian dumvivan verkistan fratinon Erika Godo el Hungario.

Kiel rajtigita lingvoinstruisto kaj rezistema virino mi vere ŝatas diversajn kulturojn el diversaj regionoj kaj landoj, kaj Esperanto donas al mi okazon konatiĝi kun ili.

Dume pluraj esperantistoj rakontis al mi pri la Esperanto-komunumo en mia lando. Mi sciis, ke jam en 1909 aperis Esperanto-grupo en mia lando. Esperanto havas longan historion en mia lando! Poste en la kurso de Kolombia Esperanta Ligo (KEL) mi renkontis aliajn partoprenantojn el mia lando kaj tra la mondo. Kaj poste mi komencis agi kun diversaj roloj en KEL kaj akiris diversajn kapablojn. En 2025 mi eklaboris en la KEL-estraro.

Mi praktikas jogon, kiu unuigas miajn menson, korpon kaj spiriton, kiel rimedon de malstreĉiĝo. Mi volas esplori, kiel disvastigi ambaŭ, jogon kaj Esperanton, en nia socio.

Laste mi invitas vin al la venonta KEL-Kongreso, kiu okazos en novembro 2026 en la urbo Cali en la departemento Valle del Cauca en sudokcidenta Kolombio. Vi povos ĝui biodiversecon kaj riĉan kulturan heredaĵon de mia lando. Mi antaŭĝojas vidi vin tie!



14. Lenke SZÁSZ (Rumanio)

Mi estas rumana civitanino loĝanta en Transilvanio/Rumanio en regiono loĝata plejparte de sikuloj (hungare parolanta nacimalplimulto). Esperanton mi eklernis en 1982, kiam mi legis gazetartikolon pri tiu lingvo.

En 1983 okazis UK en Budapeŝto, kaj mi sukcesis ricevi pasporton por mi kaj la familianoj. Tiutempe rumanaj civitanoj rajtis ricevi pasporton nur en ĉiu dua jaro, validan por 30 tagoj. Kongreskotizon mi ne povis pagi, sed la samideanoj gardostarintaj ĉe la enirejo sciis la situacion en Rumanio kaj lasis min eniri en la kongresejon. Mi aĉetis libreton kun rabatita prezo. Ĝi estis mia unua Esperanta libro! Nederlanda samideanino invitis min al la teatraĵo. La afabla Baukje fariĝis mia unua korespondantino.

Mia lingvoscio pliboniĝis per legado kaj korespondado. Mi komencis tradukadi el Esperanto en la hungaran. Poste ankaŭ el la hungara kaj rumana


lingvoj en Esperanton. En 1990, post la falo de la Ceausescu-reĝimo mi instruis Esperanton, faris ekspozicion el miaj Esperantaj libroj, kaj eĉ kongresis dufoje kun la helpo de leteramikinoj. Kun Marjorie Boulton mi korespondis ekde 1989 ĝis ŝia morto.

Mi sendis kontribuaĵojn al diversaj Esperantaj revuoj, partoprenis literaturajn konkursojn en poemoj kaj rakontetoj kaj gajnis premiojn.

Esperanto riĉigis mian vivon. Esperanto fariĝis la granda aventuro de mia vivo. Mi sentas dankemon al Zamenhof kaj al karaj gesamideanoj, el kiuj jam multaj forpasis. Ili vivas nur en mia memoro. Eble ankaŭ mi vivos en la memoro de kelkaj samideanoj.



La libroj tradukitaj de mi: supre de maldekstre “La ŝtona urbo” de Anna Lowenstein, “La triĝiba monto” de Szemlér Ferenc, “La timulo” de Békés Pál, sube “La muelilo de la fortuno” de Ioan Slavici.



15. Renée TRIOLLE (Francio)

Mi naskiĝis la 16-an de aprilo 1943 en La Ciotat (suda Francio) de inĝeniera patro kaj instruista patrino. Mi estis instruistino de la rusa lingvo.

Esperanton mi malkovris en Marseille, kiam okazis la UK en 1957

kaj poste dank' al esperantista kolegino de mia patrino s-ino Leoni kaj informprelego de François Garrigue, mi eklernis ĝin en vespera kurso. Mi, kiel plej bona lernanto de la kurso, ricevis stipendion de la grupo de Marseille al la UK en Bruselo (1960), kiu tiel entuziasmigis min, ke de tiam mi regule partoprenis UK-ojn, kaj agadis, fondinte kaj Junularan Esperanto-Francan Organizon kaj Studentan Esperanto-Rondon de la universitato Aix-Marseille.

Mi ricevis diversajn funkciojn en la movado; naciskale kaj internaciskale kiel sekretario de TEJO (1973), sekretario de Someraj Universitataj Kursoj en Liege (Belgio), unua ina vic-prezidanto de UEA, kiun mi reprezentis dum deko da jaroj en UNESKO! Mi nun estas ĉefdelegito de UEA por Francio kaj ekde 2026 honora membre de UEA.

Mi organizis dekojn da aranĝoj kaj gvidis dekojn da lingvostaĝoj, daŭre instruas en publikaj kursoj. Mi verkis diversajn lernolibrojn i.a por francaj eldonejoj "Esperanto Express".

Nun mi estas direktoro de la ekzamenoj ĉe Franca Instituto de Esperanto kaj koncentriĝas ĉe regiona informado kaj instruado. Mi ne povas imagi mian vivon sen Esperanto, kiu malfermis al mi la pordojn al la tuta mondo. Esperanto ankaù donis al mi amon al lingvoj kaj emon lerni ilin !



Miaj diversaj eldonoj (jam venis la 6a) de « Esperanto Express » ĉe eldonejo Le Dauphin



16. Julianna VAS-SZEGEDI (Hungario)



Mi naskiĝis en vilaĝo Tiszafüred en orienta parto de Hungario en 1969. En mia familio nur mia patro iom parolis fremdan lingvon, la anglan. Neniu en mia familio aŭdis pri Esperanto.

Kiam mi estis 17-18 jara, en la biblioteko mi demandis, "Ĉu vi povus doni al mi italan lernolibron?" Respondis la bibliotekistino, "La lernado de itala lingvo bezonas instruiston, do mi proponas al vi alian lingvon: Esperanton. Ĝin vi povas facile lerni memstare kaj vi ne bezonas instruiston!" Ĝoje mi akceptis la proponon kaj mi eklernis Esperanton, fakte memstare.

Sed poste mi estis for de Esperanto, kaj pasis multaj jaroj, dum kiuj mi iĝis oficiala sporttrejnisto, karate-instruisto kaj sportmasaĝisto.

Al Esperanto mi revenis en 2000, kiam mia unua filino estis 8-jara kaj la dua, 2-jara. Mi volis instrui ilin en du lingvoj, angle kaj Esperante por ke ili frue "alkutimiĝu" al fremdaj lingvoj. De tiam mi iĝis ano de Pasporta Servo, komencis partopreni en la Hungaria Esperanto-movado kaj okupiĝis ankaŭ pri instruado de Esperanto.

Mi ĉiam povis vivi feliĉe dum mia vivo, sed la veran feliĉon mi trovis en 2018, kiam mi veturis al Hanojo, Vjetnamio por instrui karateon. Nun mi vivas ĉi tie kaj ĝuas la miraklan, silentan

kaj feliĉan vivon en mia dua hejmlando, kie mi povas okupiĝi pri la du plej gravaj fakoj en mia vivo: instruado de karateo kaj Esperanto.

Mi estas dankema al d-ro Zamenhof. Esperanto donis al mi verajn geamikojn ĉie en la mondo kaj dum la lastaj 26 jaroj mi spertis/as la miraklojn de Esperanto kaj en Hungario kaj en Vjetnamio.



De maldekstre edzo Manfred, Mario Gabler, Heide Pohl, verda Helga kaj Miora en 2026

Kariero de Helga

1945: naskiĝis en Gräfenhainichen en la federacia lando Saksio-Anhalto en Germanio, kie mi loĝas ĝis hodiaŭ.
Ekde la 3a jariĝo pentris gaje.
Ekde la 14-jariĝo ekzercis portreti laŭ modeloj.
Ekde la 17-jariĝo estis membro en pentroklubo
1970: naskis la filinon Jana.
1974-1978: studis en Speciala Distrikta Kulturakademio de Halle/Saale kun la sukcesa diplomiĝo: gvidantino de Popola Artkreado por la fako pentroarto kaj grafiko.
1980: esperantistiĝis.
1988-1989: studis en la Altlernejo pri Arto en Dresdeno.
Post 1989 : instruis en diversaj artkursoj.
Pentris kiel liberprofesia portretpentristino homojn, pejzaĝojn, florojn, bestojn kaj domojn laŭ modeloj aŭ laŭ fotoj.
Pentris je privataj komisioj.
Havis ekspoziciojn kiel membro de la "Ligo pri Pentroarto kaj Grafiko" en la Lutherurbo Vitenbergo.
Instruis interesiĝantojn en kursoj kaj private en la propra ateliero.
Nun : paŭzas pro malbona sanstato.

Ekde esperantistiĝo en 1980 portretadis enlandajn kaj eksterlandajn geesperantistojn. Tiujn pli ol 270 originalajn portretojn mi donacos al la NACIA ESPERANTO-MUZEO en VIENO por estontaj generacioj. Ĉiam mi laboras kun **KREDO, AMO** kaj **ESPERO por PACO**.

Ekspozicioj: Internacia Somera Esperanto-Universitato en Bulgario en 1986,
UK en Varsovio en 1987,
UK en Berlino en 1999,
Germana Esperanto-Kongreso en Hameleno en 2015 ktp.
Libroj : « Esperanto por mi - 16 geesperantistoj portretitaj de Helga Plötner » n-roj 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9, 10, 11 kaj 12 eldonitaj de HORIZONTO..
« Mia pentrista vivo por Esperanto kaj por paco » eldonita de HORIZONTO.

Esperanto por mi 12

17 geesperantistoj portretitaj de Helga Plötner

「私にとってのエスペラント　12　- ヘルガが描いた 17 人のエスペランチスト -」

La unua eldono : la 24-an de oktobro 2026　初版発行：2026 年 10 月 24 日
La aŭtoroj: Helga Plötner kaj 17 geesperantistoj　著者：Helga Plötner ほか
La portretoj kaj pentraĵoj: Helga Plötner　肖像画・挿絵： Helga Plötner
Ateliero de pentroarto kaj grafiko de Helga Plötner:　ヘルガの連絡先
Friedrich-Ebert-Str. 9, 06773 Gräfenhainichen, Germanio
Tel. +49173 7731545, Retadreso: helga.ploetner@gmx.de
Provlegis : John HUANG (Ĉinio, Kanado)　校正：Huang (中国、カナダ)
Eldonejo: Horizonto: 2-13-3 Ootone, Maebaŝi, Gunma, Japanio, 371-0825

Telefono/Fakso: 81-(0)27-253-2524 Retadreso: hori-zonto@r.water.sannet.ne.jp
発行所：ホリゾント出版　371−0825 群馬県前橋市大利根町 2 - 13 - 3
Ĝirkonto: 00110-2-133056 堀泰雄　　振替口座：00110-2-133056 堀泰雄
Prezo: 5 eŭroj　　定価 :500 円　注文はホリゾント出版へ
Mendo : Libroservo de UEA libroservo@co.uea.org aŭ Eldonejo Horizonto
ISBN: ~~978-4-939088-76-6~~ C1095 500E

Enhavo

1. Luiza CAROL (Rumanio / Israelo)
2. CHIMEDTSEREN Enkhee (Mongolio)
3. Edeltraut HENNING (Germanio)
4. HONG Sungcho (Koreio)
5. Aleks KADAR (Francio)
6. Zahra KARIMI (Irano)
7. Carlos Alfonzo MIRANDA Bravo (Peruo)
8. Cícero Carlos OLIVEIRA da SILVA (Brazilo)
9. Larysa OSADCHUK (Ukrainio)
10. Anna kaj Mark PENTUS (Rusio)
11. Werner PFENNIG (Germanio)
12. SAIKI Akira (Japanio)
13. Astrid Caroline SASTOQUE COPONADO (Kolombio)
14. Lenke SZÁSZ (Rumanio)
15. Renée TRIOLLE (Francio)
16. Julianna VAS-SZEGEDI (Hungario)

Saluto de la portretistino



Post la unua ruĝkovrila, la dua verdkovrila, la tria blukovrila, la kvara oranĝkovrila, la kvina lazurkovrila, la sesa flavkovrila, la sepa rozkovrila, la oka violkovrila, la naŭa helverdkovrila, la deka blankkovrila, la dekunua helbrunrozkovrila ni povas prezenti al vi la lastan dekduan malhelruĝkovrilan libron.

Danke al ĉiuj portretitoj mi akiris novajn geamikojn mondvaste, sekve interesan, riĉenhavan leteramikecon. Mi amas vin ĉiujn agantojn por la estonteco de Esperanto kaj por PACO. Ni kunlaboru! Kun admiro mi demetas mian verdan ĉapon pro viaj aktivaj agadoj.

Mi, nun 81-jara handikapulino kun kronikaj doloroj kaj problemegoj. sukcesis portreti kun kuraĝa, forta VOLO, KREDO, AMO, ESPERO kaj ĜOJO entute 192 aktivulojn.

Mi nun komencis portreti laŭ peto de Małgosia Kormanicka por nova kajero PIONIRINOJN de la Esperanto-movado por la 2a Virina Kongreso en Pollando en Selina Gorá en julio 2027.

Mi donacis/os ĉiujn originalajn portretojn de geesperantistoj al la Nacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Demandu tie pri Helga Plötner pri la 12 libroj kaj

portretoj kaj la aliaj miaj du libroj.


Mi dankas tutkore la iniciatinton, kompilanton kaj eldonanton s-ron HORI Jasuo el Japanio kaj la provleganton s-ron John HUANG el Kanado.

ESPERANTO VENKU IAM TUTMONDE por ke unu komprenu la alian en bona etoso. ESTU PACO, PACO, PACO tutmonde!

Helga Plötner

Prezo: 5 eŭroj　　定価：500 円
ISBN: 978-4-939088-76-6 C1095 500E

Prezo: 5 eŭroj　　定価：500 円
ISBN: 978-4-939088-76-6 C1095 500E



Libroj de Helga Plötner

HORIZONTO

